

Honoron kaj gloron al la eminentuloj de la patrolando



Tombejo Santa Ifigenia en Santiago de Kubo. Foto: Luis Alberto Portuondo

Havano, dec 10 (RHK) La intensa labortago de la estraro de la Komunista Partio de Kubo, la anta?an tagon, estis markita de la enga?i?o al la Patrujo.

Kiam milda vento batis la palmfoliojn de la hereda tombejo de Santa Ifigenia, la Unua Sekretario de la Centra Komitato kaj Prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel Bermúdez, metis florbukedon anta? la monolito kiu gardas la cindron de la ?efkomandanto Fidel Castro Ruz.

Akompanate de la membro de la Politika Buroo kaj Organizosekretario, Roberto Morales Ojeda, la prezidento anka? oma?is al José Martí, Nacia Heroo; al Carlos Manuel de Céspedes kaj Mariana Grajales, Patro kaj Patrino de la Patrujo, kiel signo de la kontinueco de la sola Kuba Revolucio, kiu komenci?is la 10-an de oktobro 1868.

Díaz-Canel iris al la tombejo, Nacia Monumento, kien pilgrimis ?irka? cent mil homoj el Santiago, reprezentantaj la kuban popolon, la 4-an de decembro, kiam estis la oka datreveno de la deponado de la

cindro de nia historia gvidanto.

Antaŭe, li taksis la sociekonomiajn evoluojn en la ĉefaj municipoj de la provincoj Guantánamo kaj Santiago de Kubo, same kiel la progreson de la reakiro de San Antonio del Sur, post la alsturmo de uragano Oscar.

Fonto: Granma

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/371687-honoron-kaj-gloron-al-la-eminentuloj-de-la-patrolando>



Radio Habana Cuba